Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Februaro 2003 — 74-a jaro, n-ro 2 (1172)

ISSN 1163.0442 — MENSUEL/MONATA

*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem*

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**

# DEKLARO DE LA PLENUM-KOMITATO DE S.A.T. PRI MILITMINACO

La Plenum-Komitato de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) :




* **DEKLARAS** denove sian kontraŭon al ĉiuj militoj kaj **al tiu antaŭvidita en Irako,** kiu povus provoki mondan konflikton.

* **MEMORIGAS** la opozicion de nia Asocio al ĉiuj hegemonioj, fare de iu ŝtato, popolo, grupo aŭ individuo kontraŭ la aliaj, en ĉiuj niveloj: politikaj, ekonomiaj, financaj, armeaj kaj kulturaj (inkluzive lingvaj), kontraŭaj al la Homaj Rajtoj kaj al la simpla racio.

* **SUBTENAS** la Mondajn Forumojn pensante ke alia Mondo eblas.

* **INVITAS** la membrojn de U.N., parlamentanojn de ĉiuj landoj, respondeculojn de partioj, sindikatoj, asocioj, religiaj kaj filozofiaj movadoj, haltigi la memdetruan frenezecon de tiuj bolantaj cerboj kiuj ne kapablas pensi pri vivebla estonteco kaj estontaj generacioj.

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



Gekaraj, espereble tiu ĉi numero atingas vin pli frue ol la januara, kiu malfruis pro la jarfinaj ferioj de via redaktoro.

En tiu ĉi numero vi trovas informon pri la Japana Civito-Movado kaj grupoj kontakteblaj kaj subtenindaj per esperanto. Espereble tiu japana ekzemplo inspiros la kreon de similaj grupoj en aliaj landoj. Krom tio vi trovas diversajn informojn, inter kiuj pri la venonta kongreso de SAT. Ne forgesu aliĝi kaj aktive partopreni.

En la marta numero aperos la rezultato de nia referendumo kaj la nomoj de novaj membroj de nia Plenum-Komitato, kiu komencos funkcii ekde la unua de marto.

Denove mi invitas ĉiujn al kunlaboro en Sennaciulo ĉar mi bezonas materialon. Dankon.

Kamaradece via

*Redaktoro*


Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
**Commission Paritaire n° AS-74399**
**Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.**

**Komunista frakcio**

# 14a konferenco de IKEK
# 23-28.05.2003
# en Banja (apud Sofia)Bulgario

Kongrestemo:
Komunistaj movadoj en Bulgario kaj la mondo.
Renkontiĝo kun lokaj esperantistoj.

Aliĝkotizo: 25 eŭroj
Pago de kotizo al :
Dieter Rooke
Äussere Klus 14
CH-4702 Oensigert, Svisio
UEA-konto: rook-1




## SPECIALA OFERTO

Ĉe SAT restas certa kvanto de malnova P.I.V. (eld. 1987).

**Neta prezo : 40 €**
+ reg. afranko- por Francio 4,27 €, por Eŭropo 6,95 € kaj aliaj landoj 9,15 €.
Mendu ĉe SAT: 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris, Francio.
Poŝtkonto: SAT, n° 1234-22 K, Paris.




## *Nova PIV aperis !*

*Akiru ĝin ĉe SAT.*
*Prezo:70 € + afranko*
*Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €*
*ekster Eŭropo : 10,06 €*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ
Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

# CIVITO-MOVADO EN JAPANIO - GRUPOJ -

*Karaj gekamaradoj,*
*ĉi sube ni prezentas al vi la CIVITO-MOVADON en Japanio. Temas pri diversaj grupoj kiuj agadas civitane kaj sociale por helpi la aliajn kaj realigi siajn porsocialajn celojn. Ili estas kontakteblaj per Esperanto. Ni invitas niajn japanajn kaj alilandajn membrojn kontakti ilin por kunlaboro kaj subteni ilian agadon. Tiuj grupoj povas inspiri la aliajn por organizi similajn movadojn en diversaj landoj. Tio estas bela ekzemplo de SAT-eca agado per Esperanto.*

**********************

## Grupo pri senhejmeco en orienta Kobe

(ĝi apartenas al YWCA Kobe).

**Temo:** Diversaj problemoj koncerne al senhejmeco, nome, homaj rajtoj rilate al homoj, kiuj perdis siajn loĝejojn. Agado kontraŭ diskriminacio, forpelado kaj atakado al ili.
**Celo:**
Ni celas ke homoj, kiuj estas devigitaj perdi siajn loĝejojn kaj dormas en parko aŭ sur strato, povu regajni loĝlokojn. Cetere ni postulas iliajn homrajtojn kaj insistas pri ilia homa digno. **A**
**Agado** (konkrete)
-Sabatnokta rondvizitado (du fojojn monate): Viziti homojn, kiuj dormas surstrate. Interparoli kun ili, amikiĝi, ekkoni iliajn problemojn kaj trovi solvojn. Alporti varmajn trinkaĵojn, vestojn, lankovrilojn, bultenojn, ktp.
-Vizitado al malsanuloj (ĉiusemajne):
Viziti homojn kiuj enhospitaliĝis, por informi ilin pri la sociala prizorgo. Helpi ilin gajni socialajn prizorgojn (monhelpon) kaj loĝejojn. Alporti amuzajn librojn, bultenojn, vestojn se necese, ktp.
-Okazigi studkunvenojn, prelegkunvenojn, kaj ekspoziciojn pri loĝrajto, internacia regularo de homaj rajtoj, internaj leĝoj koncernaj, iliaj nunaj kondiĉoj, ktp.
-Helpi internegocadon kun urba administrantaro.
**Kontakto**
nomo: NONOMURA Yo
adreso: Hatatuka-doori 6-1-11, Tyuuou-ku, Kobe 651-0068, Japanio
retadreso: <cfu94530@nyc.odn.ne.jp>
La supra persono estas: aganto
Agadloko: orienta parto de urbo Kobe
**Mesaĝo**:
1. En Japanio pli kaj pli multiĝas la nombro de homoj, kiuj perdas sian laboron kaj sekve loĝejon, pro ekonomia tutmondiĝo. Tial grandiĝas diferenco inter riĉuloj kaj malriĉuloj.
2. Homoj, kiuj ne havas adreson, malfacile povas ricevi socialan prizorgon. Ofte tio ne eblas.
3. En japana socio ekzistas ofte antaŭjuĝoj kaj diskriminacio al «senhejmuloj» .
4. Junuloj ofte atakas ilin kaj eĉ mortigas, pensante tiun agon justa aŭ «plibonigo de socio».
5. Mi volas interŝanĝi informojn kaj opiniojn pri tiaj problemoj, sociaj sistemoj pri bonfarto, malriĉeco kaj tutmondiĝo. Mi ankaŭ volas scii kiel oni aplikas «internaciajn regularojn de homaj rajtoj».

***

## Diskutejo por Paco kaj Kulturo de Ube

(japane: Ube Heiwa to Bunkao Kataru Kai)

**Temo kaj Celo:**
Diskuti kaj agadi por loka movado por konservi pacon kaj homajn rajtojn, kontraŭ Japana militista politiko subalterna al Usono, kaj diskuti kaj agadi por starigi lokan, popolan kaj rafinitan kulturon kontraŭ ŝablona kulturo trudita de mamonisma kapitalismo.
**Agado:**
Ĉiun unuan sabaton de la monato ni havas prelegkunveneton nomatan «Sabata teotempa kurso». En Aprilo 2002 ni organizis prelegkunvenegon, invitante famkonatan kritikiston Shuichi Kato, en kiu kunveno ĉeestis 400 aŭskultantoj .
**Kiel kontakti:**
K-do Tetu MAKINO
adreso: 3-12-1-102, Norisada, Ube, 755-0003, Japanio,
retadreso: <Tetu.Makino@mc3.seikyou.ne.jp>
La supre menciita persono estas aganto.

***

## WRI/Peace News-legantoj

(“Peace News” (Pacnovaĵo) estas organo de WRI (Internacio de Militrezistantoj).

**Temo kaj celo:** Pacismo
**Agado:** diversaj agadoj por paco.
**Kiel kontakti**:
Tani Hiroyuki, <tnhryk@pop07.odn.ne.jp>
La supra persono estas : eksa aganto, nun amiko de aganto.

***

## La helpa societo aganta por vivo kaj homrajtoj de rehejmuloj al Norda Koreio

**Temo kaj celoj:**
Helpas vivon kaj homrajtojn de rehejmuloj, koreanoj kaj japanoj, kiuj post milito foriris al Norda Koreio kredante al surtera paradizo, per repatriiĝa entrepreno kiu okazis inter la jaro 1959 kaj 1984.
**Agado:** Esploras pri realaj kondiĉoj, kaj dokumentas tion,